

Werner Bormann
Bona Ŝanco, 2-a parto
Claude Gacond, 414-a radioprelego, 1971.09.15 & 18

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni prezentis al vi la libron *Bona Ŝanco* de Werner Bormann, kiun Stafeto aperigis komence de la somero. Hodiaŭ ni legos al vi kelkajn erojn el ĉapitro titolita *Sciencaj obstakloj por internacia lingvo*. Ni citas Werner Bormann :

A.- *La starpunkto de la grandega plimulto de la lingvistoj rilate Esperanton estas stranga. Se oni volas ĝuste karakterizi ĝin, oni rapide rimarkas, ke ĝi ne povas esti nomata kontraŭa. La lingvistoj ĝis nun ne vere pripensis la problemaron, kaj pro tio ankaŭ ne povis veni al nea opinio. Kontraŭulo oni ja nur fariĝas, se el zorga ekzameno de ĉiuj argumentoj rezultas pli granda signifo de la malfavoraj ol de la pozitivaj. Sed tio ankoraŭ ne okazis. Do la lingvistoj ankaŭ ne verdiktis pri Esperanto. Ili tutsimple estas indiferentaj pri la problemo de internacia lingvo.*

Cl.- *Tiu indiferenteco estas treege malkontentiga. Pro ĝi la lingvistoj ne konatiĝis kun la altgrade interesaj problemoj de internacia lingvo. Ili do ankaŭ ne esploris la temojn. Tial ili ne povis ĉiu por si ellabori la konvinkon, kiom Esperanto povus forigi la lingvajn malfacilaĵojn en la internaciaj rilatoj. Pri tiu servo de Esperanto la registaroj iam ekpetos ekspertizojn, kiam ili preparos la leĝan enkondukon de mondlingvo. La politikistoj tiam direktos sin al tiuj sciencistoj, kiuj hodiaŭ ne estas pretaj okupiĝi pri tiu temo. Tio signifos por tiu fazo gravan malbonigon de niaj ŝancoj. Ni devas tial klopodi, instigi la lingvistojn eklabori plejeble frue ankaŭ en tiu fako.*

A.- *Sed ĉiam denove la provoj fiaskas antaŭ la muro de la indiferenteco. Por rompi ĝin estas necese esplori, kial la lingvistoj daŭre permesas al malnovaj antaŭjuĝoj ŝajnigi al ili falsan bildon. La obstineco, kun kiu scienca okupiĝo estas rifuzata, estas preskaŭ nekomprenebla. La lingvistoj devas havi tre fortajn kaŭzojn por tiel konduti. Nur se ni sukcesas malkovri tiujn kaŭzojn, ni povas ja esperi venki la indiferentecon, kaj poste ankaŭ atingi, ke la lingvistoj kaj alifakaj sciencistoj kontribuos per gravaj ekkonoj al la prospero de la mondlingvo.*

Cl.- Werner Bormann poste montras, ke la sciencoj evoluas de la konstata de la faktoj al la influado de la faktoj. Ni ree citas lin : *Plej multaj sciencoj observas la faktojn por poste ilin adaptigi, korekti, influi.* Koncerne la lingvosciencon Werner Bormann konstatas, ke la lingvoscienco ĝis nun nur havas la celon esplori iun uzatan lingvon. Sub tiu rubriko de lingvoscienco ankaŭ okazas la lingvoinstruado. Ĝi do estas pure konstata.

A.- *Lingvistiko estas diagnoza scienco, ne terapia. La esplormetodo en ĝi ankoraŭ regas, kiu ĉe la aliaj sciencoj nur estas antaŭkondiĉo por la ĝeneralaj taskoj aktive influi la vivon. Kontraŭe al la aliaj sciencistoj, lingvisto laboras en pasiva sinteno al sia studobjekto.*

Cl.- *Esperanto nun kiel lingvosciencia fenomeno ne harmonias kun tiu pasiva sinteno. La esplortemoj de lingvistiko estas la ekzistantaj lingvoj. Sed esperanto iam ne estis ekzistanta lingvo. Ĝi estas artefaritaĵo. Doktoro Zamenhof kreis lingvon. Li estis aktiva sur la lingvosciencia tereno. Li ne kontentiĝis esti lerninta lingvojn, sed li konstruis novan el ili. Lia aktiveco kaj ĝia rezulto, la Internacia Lingvo Esperanto, estas io, kio laŭ la ĝeneralaj konceptoj pri lingvistiko estas neebla.*

A.- *Doktoro Zamenhof agis kiel natursciencisto. Tiuj fakuloj kutime tiel laboras, ke ili, el diversaj specoj de objektoj de sia fako, faras ion pli taŭgan. Tiuj sciencistoj disponigas per sia laboro ion pli bonan al la homoj, ol la naturo mem havas. Ekzemple fakulo, al kiu ne plaĉas la normala tritiko, celas per daŭra semmiksado atingi fruktriĉan, per malsanoj ne tiel facile atakeblan tritikon, kiu eltenas ankaŭ ekstremajn klimatojn.*

Werner Bormann
Bona Ŝanco, 2-a parto
Claude Gacond, 414-a radioprelego, 1971.09.15 & 18

Cl.- *Se la lingvistoj akceptus la vivantecon de Esperanto kiel fakton, tio rompus la grundon, sur kiu ili staras. Esperanto estas por lingvisto nova dimensio en lia scienco ; ĝi ne nur estas iu nova esplorinda fenomeno. Por la lingvosciencistoj ĝi signifas novan faktoron en ilia fako. Esperanto estas la komenco de nova periodo en tiu scienca fako. Ĉar ĝi estas tiel fremda al la kutimaj laboroj de lingvistoj, ĉi tiuj ne povis ĝis nun trovi la ĝustan sintenon al la problemo de internacia lingvo. La nova dimensio por ili ankoraŭ ne malfermiĝis. Tial ili devas esti indiferentaj,* konkludas Werner Bormann.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-